45a Jaro - N-ro 2a - Aprilo 1953

BELGA ESPERANTISTO

Ĉefredaktoro :
Maur. JAUMOTTE
Avenuo De Bruyn, 44
Wilrijk-Antverpeno

DUMONATA REVUO, OFICIALA ORGANO
DE
REĜA BELGA LIGO ESPERANTISTA
Asocio sen profita celo,
aliĝanta al UNIVERSALA ESPERANTO - ASOCIO
Socia Sidejo : 106, rue Général Lotz, Bruselo



UNU EL LA GRANDAJ MODERNAJ DOMKOMPLEKSOJ
EN ANTVERPENO,
URBO DE LA BENELUKSA ESPERANTO-KONGRESO.

REĜA BELGA LIGO ESPERANTISTA

106, rue Général Lotz, Bruselo

— ASOCIO SEN PROFITA CELO —

Statutoj : *Moniteur Belge - Belgisch Staatsblad*, n-ro 115, 27 Junio 1936.

HONORA KOMITATO

S-ro Frans VAN CAUWELAERT,
Prezidanto de la Deputitaro.

S-ro J. VAN HOUTTE,
Ĉefministro, Deputito.

S-ro Achille VAN ACKER,
Eksĉefministro, Deputito.

S-ro Robert CATTEAU,
Vic-Prezidanto de la Senato, Skabeno de Bruselo.

S-ro Lode CRAEYBECKX,
Urbestro de Antverpeno, eksministro, Deputito.

S-ro Georges MAZEREEL,
Senatano.

S-ro Georges MICHELET,
Honora Direktoro de la Komerca Ĉambro de Bruselo.

BELGA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE REĜA BELGA LIGO ESPERANTISTA

45a Jaro — Aprilo 1953 — N-ro 2a

Lasta Alvoko - Unua Saluto

Ne kiel Redaktoro de « Belga Esperantisto », sed kiel Prezidanto de la Loka Kongresa Komitato, mi hodiaŭ skribas tiujn ĉi kelkajn liniojn, kiuj antaŭiras Komunikon ampleksan kaj detalan pri ĉio, kio okazos en Antverpeno dum la Pentekostaj tagoj.

La celo de tiuj ĉi kelkaj linioj estas alvoki vin, por ke vi tuj aliĝu se vi ne jam faris; kaj por ke vi ankaŭ tuj ensendu vian aliĝilon, ĉar speciale la loĝado estas problemo ne facile solvebla en urbo en kiu, dum la pentekostaj tagoj, okazos diversaj gravaj Kongresoj.

Kaj dua celo estas, jam de nun, sendi al vi plej koran bonvenigan saluton : Estu certaj ke la organizantoj ĉion faris, faras kaj faros por ke, de ĉe via alveno, vi eksentu ke vi eniras familian rondon kaj estas en Antverpeno, — meze de la Verdstelanoj kaj de aliaj esperantistoj, — vere hejme. Kaj por ke ni ĉiuj kune, en- kaj eksterlandanoj, povu ĝui tri memorindajn tagojn, pri kiuj oni, en vasta rondo, ankoraŭ longe parolos.

Maur. JAUMOTTE.

Beneluksa Esperanto-Kongreso

OFICIALA KOMUNIKO N-ro 3.

Jen la plej freŝdataj kaj kompletaj informoj pri nia granda okazajo pentekosta !

Nombro da aliĝintoj : pli ol 250.

Jam akceptis membrecon de nia honorkomitato : Ŝtatministro Kam. Huysmans, la Provincestro, la Urbestro, la skabeno de Publika Instruado kaj — last but not least — la Ĝenerala Konsulo de Nederlando, lia Moŝto **Duco Middelburg**, kiu persone ĉeestos kelkajn programerojn i.a. la oficialan malfermon de la Kongreso kaj alparolos la ĉeestantojn, **en Esperanto.** Tio instigos nin ĉiujn, — precipe la LEEN-anojn, — multnombre aliĝi kaj ĉeesti !

Inter la aliĝintoj, estas : s-ano W. Solzbacher, prezidanto de EANA (Usono) kaj Akademiano, kiu promesis partopreni; s-ano T. Jung (« Heroldo de Esperanto »), kaj Delegito de UEA (*). Partoprenos ankaŭ unu aŭ du luksemburganoj tiel ke nia Kongreso nepre estos « beneluksa ».

En la ĉi-monata gazeto vi ree trovos aliĝilon kaj ni insiste petas, se vi ne jam faris, tuj sendi ĝin al la sekretario de la L.K.K., S-ro Henri Sielens, Houwerstraat, 12, Antverpeno. Pagu ne nur la kongreskotizon, sed samtempe la aliajn aranĝojn, ĉar i.a. la malaltprezaj hoteloj ne disponas multajn ĉambrojn kaj jam pluraj mendoj estas notitaj.

Ne ripetante la novaĵojn, kiujn vi legos en la suba programo, ni tamen substreku ke nia poŝt-oficejo funkcios sabate kaj ke poste ni mem kolektos

(*) *Je la momento de la presado, ni ekscias ke estas D-ro Paul KEMPENEERS, vicprezidanto de U.E.A., kiu reprezentos la internacian movadon ĉe la Beneluksa Kongreso kaj kiu ankaŭ alportos apartan saluton al la tri Ligoj aliĝintaj al U.E.A.*

Antaŭ-Kongreseto

Vendredon, la 22an de majo, je la 20,30a h. okazos en « Witte Leeuw », Frankrijklei, EKI-vespero, kiel enkonduko al la Beneluksa Kongreso.

S-ro W. Solzbacher, prezidanto de EANA (la Nord-Amerika nacia Ligo aliĝinta al UEA) jam firme promesis ĉeesti ekde tiu tago kaj paroladi dum tiu vespero.

Aliaj eminentuloj verŝajne jam estos ankaŭ alvenintaj kaj povos oratori.

Ĉiuj esperantistoj de Antverpeno kaj el en- kaj eksterlando estas bonvenaj dum tiu certe interesa interkonatiga vespero.

Post-Kongreseto

Lundon, la 25an de majo, je la 17a horo, okazos la oficiala ADIAŬO, ĉar diversaj kongresanoj nepre devos foriri por kapti la lastan vagonaron, kiu ilin rehejmigos je deca horo.

Multaj tamen ankoraŭ disponas pri tempo kaj « LA VERDA STELO » decidis organizi por ili, tuj poste, — tio signifas post kvaronhora paŭzo, — grandan KABAREDAN VESPERON, kiu daŭros proksimume du horojn kaj estos sekvata de DANCADO.

Ĉiuj Kongresanoj estas bonvenaj.

Aliaj personoj nur kun speciala invitilo.

---

la poŝtajojn por ke ili ricevu la oficialan kongresan stampon. Atentu pri la kongresa memoriga poŝtkarto (Fr. 5.— aŭ cendoj : 40) ĉe la sekretario : la kvanto estas vere limigita kaj tiu maloftajo rapide estos... maloftega !

La kongreslibro — ilustrita — havos almenaŭ 42 paĝojn kaj estos sendata al la aliĝintoj je la 15-a de majo venonta, tiel ke ĉiu havos la tempon zorge trastudi ĝin. Listo de la — tiutempe — aliĝintaj kongresanoj aperos en ĝi. Reklamoj estu rapide varbitaj kaj senditaj al la sekretario, antaŭ la 4-5-53. Jen la tarifo :

1/1 paĝo : b. fr. 750,—; ½ paĝo : b. fr. 400,—; ¼ paĝo : b. fr. 225; 1/ paĝo : b. fr. 125,—.

Ĉu ni sciigu ke la partoprenantoj ĝuos fervojan rabaton de 25 % (por eksterlandanoj : de la belga limo !) : la rabatilo estos baldaŭ sendata !

Programo

Sabaton, 23-5-53 :

13.30 h. — Malfermo de la akceptejo, informoj kaj transdono de la kongresaj dokumentoj.

Notu ke, se ejo ne estas indikita, temas pri la salonegoj « Ambassades », Annessensstr., 20, je 500 m. de la centra stacidomo.

— Malfermo de nia oficiala poŝtoficejo (aĉeto de poŝtmarkoj kaj de nia memoriga poŝtkarto) ;

— Malfermo de la Libro-Ekspozicio de Belga kaj Flandra E. Institutoj.

16 h. Jarkunsidoj de Belga Esperanto-Instituto kaj Flandra Esp.-Inst.
Gvidata promenado tra la urbo. Oratora konkurso de RBLE.

17 h. **Laborkunsido de Reĝa Belga Ligo Esperantista.**
Ligestrar-kunsido de Fl.L.E.

18 h. Kultura Horo kun parolado de D-ro I. Lapenna pri UNESKO.

19 h. Oficiala Malferma Kunsido de la Beneluksa Kongreso.
Fermo de la poŝtoficejo kaj de la Libro-Ekspozicio.

20.30 h. Granda Kongresa Balo.

Dimanĉon, 24-5-53 :

8.30 h. Diservo por Katolikoj (Kapelo St. Jan Berchmans, Meir 36) kun prediko de lia Pastra Moŝto De Mayer.

Nia Honora Kolono 1953

En la numero de oktobro 1952a. ni publikigis la Honoran Kolonon por nia Kongreso de 1953.

Ĉi enhavis 66 nomojn (la lasta nomo estis tiu de S-ro Dollez, kun la numero 67, sed N°.16 mankis en la listo).

Ni publikigas ĉi sube la nomojn de la pliaj aliĝintoj al nia pentekosta Kongreso, ĝis la momento de la presado de tiu ĉi numero :

66. S-ro W. Dollez (Antverpeno); 67. S-ro Morris De Ketelaere; 68. F-ino Henny De Ketelaere; 69. F-ino Paula De Ketelaere; 70. F-ino Johanna De Ketelaere (Antverpeno); 71. S-ro Truyens; 72. S-ino Truyens (Antverpeno); 73. S-ro Campe (Antverpeno); 74. S-ro Lonthie (Antverpeno); 75. S-ro Mathieu Guyot (Barchon); 76. D-ro Marcel Roost (Antverpeno); 77. S-ino Lefebvre-Janssen (Bruselo); 78. F-ino Elisabeth De Winter (Antverpeno); 79. S-ro René Balleux; 80. S-ino N. Balleux (Antverpeno); 81. S-ro Alfons Vercruyssen (Antverpeno); 82. S-ro August Debacker; 83. S-ino Germaine Debacker (Antverpeno); 84. S-ro Gustave Vermandere (Antverpeno); 85. S-ro Adhémar Verhoeven (Antverpeno); 86. S-ro Remy Van Eynde (Antverpeno); 87. S-ro Achilles De Martelaere (Gento); 88. S-ro Jozef Van Gulck (Antverpeno); 89. S-ro Frans De Bruyn (Antverpeno); 90. F-ino Henriette Heyens (Antverpeno); 91. F-ino Marcelle Moriamé (Antverpeno); 92. S-ino Louise Timmermans (Hove); 93. S-ro Jules Van Nereaux; 94. S-ino Marguerite Van Nereaux (Antverpeno); 95. S-ro Karel Ameryckx; 96. S-ino Maria Ameryckx; 97. F-ino Maria Ameryckx; 98. F-ino Jeanne Ameryckx (Merksem); 99. Inĝ. Louis Deroisy (Antverpeno); 100. S-ro Louis Colling (Bereldange, Gr. D. Luks); 101. F-ino Blanche Geers (Heide-Kalmthout); 102. F-ino Mathilde Willems (Bruĝo); 103. S-ro Walter Van Nereaux (Antverpeno); 104. S-ro Karel Van Gompel (Hoboken-Antverpeno); 105. S-ro

---

— Diservo por Protestantoj (Lange Winkelstr. 5).

9.30 h. Malfermo de la akceptejo.

10 ĝis 11.30 h. **Solena Kunsido de Reĝa Belga Ligo Esperantista.**

— Jarkunsido Fl.L.E.; — Laborkunsido LEEN.

11.30 h. Fermo de la akceptejo.

12 h. Akcepto fare de la Urbestraro en la Urbodomo (Granda Placo).

13.15 h. Oficiala Fotografado (Ŝtuparo de Flandra Operdomo).

13.30 h. Komuna Tagmanĝo (Supo, antaŭmanĝo, viando-terpomoj-legomoj, deserto kaj kafo).

15 h. Laborkunsido LEEN (daŭrigo).
— Promenado tra la urbo, vizito de la muzeo Plantin, gvidota de S-ro Maur. Jaumotte.

18.30 h. Komuna Panmanĝo (« Angla telero », bulkoj kaj kafo aŭ teo).

20 h. Festvespero : teatra kaj amuza vespero (kunlaboro de la tri asocioj).

Lundon, 25-5-53 :

9 h. Enŝipiĝo en « Flandria »-boato ĉe Steenkastelo kaj ekskurso tra kaj ekster la haveno (la boato estos « fermebla » ĉe malbona vetero !)

13 h. Komuna varma tagmanĝo.

14 h. Vizito al la Rubensdomo, gvidota de S-ro Jaumotte.

16 h. Ferma Kunsido.

17 h. Adiaŭo (17.43 h. kaj 18.45 h. forveturos el la Centra Stacidomo vagonaroj al Roosendaal, Rotterdam, Hago kaj Amsterdamo).

17.30 h. Post-kongreseto (vidu la apartan informilon).

Reĝa Belga Ligo Esperantista, a. s. p. c.

POST LA SUBAKVIGOJ

En la numero de februaro, ni prezentis la esprimon de nia plej sincera kunsento al niaj amikoj en la lando, en Nederlando kaj en Britujo, kiuj estis trafitaj de la terura uragano, en la nokto de la 31a de januaro.

Nia Ligo siaflanke ricevis de diversaj naciaj asocioj, de grupoj kaj ankaŭ de individuaj esperantistoj leterojn kun naciaj asocioj, de grupoj kaj ankaŭ de helpo diversspeca.

Al ĉiuj iras, nome de niaj subakvigitoj, nia tre kora danko.

Jozef Vinck; 106. F-ino Lea Vinck (Antverpeno); 107. S-ino Maria Philips (Antverpeno); 108. F-ino Françoise Jaspers (Antverpeno); 109. S-ino Philomena Mortelmans (Deurne-Antverpeno); 110. S-ino Madeleine Stern (Bruselo); 111. S-ino E. C. Ernst (Bruselo); 112. S-ro Philemon Van Geit (Bruselo); 113. S-ro D. van der Stempel; 114. S-ino R. van der Stempel (Anderlecht); 115. S-ro Johano Oleffe; 116. F-ino Gisèle Oleffe; 117. F-ino Nicole Oleffe (Woluwe St. Pierre); 118. S-ro P. Vanderhoydonck (Mariaburg); 119. S-ro Félix Swinne (Bruselo); 120. S-ino Génia Thibau (Antverpeno); 121. F-ino Golda Leibovitche (Antverpeno); 122. S-ro Pierre Peelman (Antverpeno); 123. S-ro Désiré Roland (Ekeren-Antverpeno).

Tiuj ĉi numeroj rilatas al la honora kolono kaj al la kongresanoj membroj de nia Ligo.

Ili nè estas la numeroj en la Beneluksa Kongreslisto, ĉar en tiu ĉi la listoj enscnditaj de la tri Ligoj intermiksiĝas.

Tiuj numeroj aperos en la Kongreslibro, kiun ĉiuj aliĝintoj ricevos.

BENELUKSA KANTO

Okaze de nia Beneluksa Kongreso, nia Antverpena samideano, membro de « La Verda Stelo », S-ro Aug. Debacker komponis, sur poeziaĵo de S-ro Hector Vermuyten, belan kanton pri Benelukso kaj kiun ĉiuj kantos dum la Kongreso.

Muziko kaj teksto estos presataj en la Kongreslibro, kiu aperos antaŭ la Kongreso.

ADMINISTRANTARA KUNSIDO DE REĜA BELGA LIGO ESPERANTISTA

La administrantaro kunsidis en Bruselo la 11-an de aprilo 1953, sub la prezidanteco de D-ro KEMPENEERS, Prezidanto.

Ĉeestis : S-ro Jaumotte, vic-prezidanto; S-ro Sielens, ĝenerala sekretario; S-ino Plyson, kasistino; S-ro Soyeur, sekretario; S-roj Groothaert, Paulus, Poupeye, Van den Bossche, Verstraeten, administrantoj.

Senkulpigis sin : S-roj Pilloy kaj Vandevelde.

1. — Legado kaj aprobo de la protokolo de la antaŭa kunsido.
2. — Financoj : La kalkuloj saldiĝas favore; ili estas aprobitaj de la komisaroj kaj estos prezentataj al la ĝenerala kunsido.
3. — D-ro Kempeneers estas elektata kiel komitatano de U.E.A. Eventuale anstataŭos lin : S-inoj Plyson kaj Schoofs.
4. — Belga Esperantisto : la 2-a numero aperos antaŭ la 1-a de majo.
5. — Beneluksa Kongreso : La L.K.K. insistas pri rapida mendo de loĝado.
6. — La venonta kunsido okazos la 13-an de junio.

La sekretario,
J. SOYEUR.

* * *

GENERALA LAŬLEĜA JARKUNSIDO

La ĝenerala kunsido okazis la 11-an de aprilo 1953, en Bruselo. Ĝin prezidis : D-ro P. KEMPENEERS, Prezidanto.

66 membroj ĉeestis aŭ estis reprezentataj.

1. — La ĉeestantaro aŭskultis kaj aprobis la raporton de la administrantaro.
2. — Ĝi aprobis la bilancon kaj la kalkulojn de la jaro 1952.
3. — La kotizo por 1953 ne estis ŝanĝata.
4. — La budĝeto por la jaro 1953 estis aprobata.
5. — Laŭstatutaj elektoj : Ĉiuj administrantoj estis reelektataj. Laŭ la nombro de siaj membroj, la Brusela Grupo rajtas havi plian administranton : por tiu posteno, oni elektis F-inon Obozinski.

   Komisaroj : estis reelektataj, S-roj Mathieux, Alofs kaj Everaerts.

La sekretario. J. Soyeur. — La Prezidanto, P. Kempeneers.

* * *

I.E.L.I.

ATENTU ! — F-ino Simone OBOZINSKI (364, avenue Brugmann, Uccle) estus dankema al la geinstruistoj aŭ geprofesoroj (esperantistoj) kiuj volus sin konigi. Ŝi estas delegitino de I.E.L.I. (Internacia Esperantista Ligo de Instruistoj), kaj deziras starigi liston sendotan al la Prezidantino F-ino NIXON, el Birmingham, kiu petas precipe nomojn de « aktivaj aŭ almenaŭ interesataj personoj ».

* * *

Ĉeĥoslovakujo. — Kreiĝis unueca Asocio de Invalidoj, kiu celas disponigi al invalidoj konsilojn kaj helpon; ĝi ankaŭ zorgas pri ilia klereco kaj socia vivo. La Asocio ŝatas kunlaboron kun invalidoj de la tuta mondo. En la prezidantaro estas aktivaj Esperantistoj, kiuj deziras praktike utiligi Esperanton. Ĉiu interesulo, pri invalidoj skribu al S-ro Jos AMBROŽ, Špaĉkova, BRNO-Zidenice (Ĉeĥoslovakujo).

La Nordfranca ĵurnalo « Nord-Eclair » aperigas ĉiudimanĉe Esperanto-kronikon en la kadro de sia junulara paĝo.

En 1952a, aperis en tiu ĵurnalo :

100 mallongaj informoj pri la internacia movado;

18 longaj artikoloj pri la ĉefaj okazintaĵoj de la esperantista jaro (Ok el tiuj artikoloj aperis kun fotoj).

Esperanto-kurso, kiu enhavis 10 lecionojn.

La redaktoro de la semajna Esperanto-rubriko ĉe « Nord-Eclair » estas nia franca amiko Lucien Giloteaux, kiu ĉeestos Pentekoste en Antverpeno, kaj konsekvence, artikolo pri tiu Kongreso aperos en tiu grava Nordfranca gazeto kiu havas ankaŭ belgan eldonon !

LA 38a UNIVERSALA KONGRESA EN ZAGREB

Adreso : 38a Universala Kongreso de Esperanto Poŝtfako 213, Zagreb.

Kotizo : De la komenco de tiu-ĉi monato, la plej alta kategorio de kotizoj validas :

T.e. por kongresano .. ... 380,—
Por Edzino ... ... 190,—
Por junulo malpli ol 20 jaroj 140,—

Oni povas aliĝi al la kongreso pere de Reĝa Belga Ligo Esperantista, 106, rue Général Lotz, Bruselo.

Oni ĝiru la kotizon al P.C.K. 1337.67 de Reĝa Belga Ligo Esperantista, Bruselo.

La L.K.K. atentigas pri la fakto ke post la 30a de Junio, ĝi malakceptos ĉiujn aliĝojn. La aliĝiloj devas esti en Zagreb je tiu dato.

JALUZO

Pri la virina jaluzo, jen historio kiun Sacha Guitry rakontis.

Iun tagon, Adamo diris al Eva ke li devas iri al la ĉaso, sed li ne malfruiĝos. Li foriris, sed lia foresto ŝajnis tro longa al la senpacienca edzino, tiamaniere ke, kiam li revenis, ŝi havis malbonan mienon.

— Diru, kion vi faris, la tutan tagon ?

— Mi ĉasadis, kiel mi diris al vi.

— Ne... mi perceptas ke vi kaŝas ion al mi... Ĉu vi hazarde renkontis iun ?

— Kia demando, karulino ! Vi bone scias ke ĉi tie ne estas aliaj homaj kreitoj ol ni du.

Kaj ne plu okupante sin pri la afero, li ekdormis. Tamen liaj vortoj ne kontentigis Evan, suspekteman ke li ne diris la veron. Tial, tuj kiam ŝi konvinkiĝis ke ŝia kunulo dormas profunde, ŝi proksimiĝis al li kaj zorge kalkulis ĉiujn liajn ripojn, unu post unu...

(Brazila Esperantisto.)

Paso post Paŝo en Esperanto 8.

Tiun-ĉi fojon ni ne pritraktos iun specialan gramatikan temon: ni simple volas iom rakonti pri Esperanto. Ankaŭ en la estonteco ni kune iom pli funde pristudos kelkajn detalojn pri la Esperanto-movado, ĝia historio, literaturo, k.t.p. Ĉiam poste ni uzos tiujn tekstojn por denove doni prigramatikajn klarigojn.

Por tiu ĉi leciono ni elektis tekston el la malnova lernolibreto « Kursa Lernolibro » de unu el la plej grandaj stilistoj el nia movado : D-ro Edmond Privat.

PRI LA HISTORIO DE ESPERANTO

En la jaro 1887 aperis en Varsovio la **unua lernolibro de la lingvo internacia de D-ro Esperanto** (pseŭdonimo de la aŭtoro : Dro Ludoviko Zamenhof). Naskiĝinte en 1859 en Bielostok, kie loĝas kaj intermalpacas kvar malsamlingvaj popoloj, Zamenhof jam de sia knaba juneco komencis studi kaj labori pri internacia lingvo. Kvankam li fariĝis profesie okulisto, lia ĉefa celo en la vivo estis, ĉiam helpi al interkompreno de ĉiuj nacioj per helpa komuna lingvo neŭtrala.

Antaŭ la publika apero de Esperanto, Zamenhof dum multaj jaroj kutimiĝis pensi kaj verki rekte en la nova lingvo. Tial ĝi jam havis komencon de originala literaturo, kiam ĝi aperis. Post 1887 la lingvon lernis kaj uzis ĉiam pli granda nombro da ĉiulandaj adeptoj, kiuj per sia proza aŭ poezia verkado iom post iom pliriĉigis la lingvon kaj kreis tradicion en nia stilo.

De 1905 okazis ĉiujare tutmondaj kongresoj de Esperantistoj, kaj en tiuj grandaj internaciaj kunvenoj montriĝis pli kaj pli rimarkinda unueco en la elparolado de la lingvo, kaj ankaŭ kreiĝis tradicio en la parola stilo. Pro tio kaj ankaŭ pro la fakto, ke la plej granda parto de la Esperanta vortaro estis alportata de la vivo iom post iom kaj aldonata al la unua tre malvasta vortareto de D-ro Zamenhof en la komenco, oni ĝenerale konstatas, ke Esperanto fariĝis nun **vivanta lingvo.**

Ĝian tujan praktikan utilon pruvas la grandaj servoj de Universala Esperanto-Asocio (U.E.A.), kiu havas delegitojn en la plej multaj urboj de la mondo kaj ebligas facilan internacian informadon, anoncadon aŭ vojaĝadon per Esperanto. La jarlibroj de U.E.A. entenas liston de tiuj delegitoj kaj utilajn informojn pri la praktika uzo de Esperanto. Dank' al tio, miloj da turistoj aŭ komercistoj nur uzante Esperanton, povis vojaĝadi, junuloj trovis oficojn fremdlande, junulinoj sendanĝere travojaĝis grandajn urbojn. Internaciaj societoj fondiĝis por tutmondaj idealaj aŭ profesiaj celoj. Kelkaj miloj da libroj estas presitaj en Esperanto, tradukitaj el ĉiuj naciaj literaturoj aŭ originale verkitaj de Esperantistaj aŭtoroj.

Ekzistas multaj Esperanto-gazetoj, revuoj aŭ jurnaloj en plej diversaj lokoj kaj kun plej diversaj celoj.

EKZERCO : Post legado de la ĉi-supra teksto, vi relegu ĝin, klarigante al vi la diversajn gramatikajn detalojn, la malfacilajojn, la verbajn formojn, la posedajn pronomojn (tria persono) k.t.p. Laŭbezone vi notu viajn rimarkojn kaj en nia proksima numero vi povos kontroli per la sekvonta «Paŝo».

H. S.

BELGA KRONIKO

ANTVERPENO

Esperanto-Grupo « La Verda Stelo »

(Poŝtĉekrumero : 726.54)

Dum februaro preskaŭ ne okazis kunveno nek kursoj pro la daŭra tramstriko.

La 20an de februaro la regula grupa vivo rekomenciĝis kaj la kunveno estis dediĉata al bone sukcesinta parolata ĵurnalo.

La 27an prelegis tre agrable el la libro « Miru, Pensu, Ridu », F-ino H. De Ketelaere kaj S-ro J. Verstraeten.

Marto estis enkondukata per parolata ĵurnalo en kiu flanke de la junuloj precipe la veteranoj sin rimarkigis.

La 13an, sub ĝvidado de S-ro Peelman okazis kabareda vespero de « La Klopodantoj ». Prizorgis la muzikan parton : F-inoj Cl. Peeters kaj F. Meulemans, S-ro W. Van Nerceaux kiel solisto akiris apartan aplaŭdon. La deklamaĵoj de S-ro A. Verhoeven vigle interesis la aŭskultantojn kaj amuzaj prelegoj de F-ino E. Van der Weken kaj S-ro J. Verstraeten kreskigis la gajan atmosferon. Grandan sukceson meritis la interpretantoj de la diversaj skeĉoj : Ges-roj Truyens, S-ro P. Peelman, S-ro K. Ameryckx, S-ro W. Van Nerceaux. Dankvorto de la Prezidanto, S-ro M. Jaumotte, esprimis la kontentecon de la ĉeestantoj.

La 20an F-ino L. De Winter enkondukis diskutvesperon. Interesa temo : « Alkoholismo aŭ abstinenco » donis al ŝi la okazon klarigi diversajn argumentojn por kaj kontraŭ la du ismoj. Poste pluraj membroj vigle parolis kaj diskutis. La Prezidanto finfine iom neŭtre konkludis !

La postan tagon, en la belegaj salonegoj de « Ambassades », kie okazos la Beneluksa Esperanto-Kongreso, Flandra Grupo Esp. kaj « Verda Stelo » organizis komunan printempan balon. La balo okazis en tre bona atmosfero, dank' ankaŭ al tre bona orkestro. Precipe la junuloj de ambaŭ grupoj entuziasmiĝis kaj la lastaj dancemuloj forlasis la salonon je la 4a matene. Konkludo : sukceso kiu instigas al pliaj komunaj aranĝoj.

La 27an, S-ro R. Van Eynde prezentis la francan sonfilmon « Monsieur Hector » de Fernandel. La nombro de la ĉeestantoj montris la sukceson kaj la intereson por tiaj vesperoj. En la estonteco pliaj programoj estos organizataj.

La 3an de aprilo, la membroj partoprenis al la parolata jurnalo kun la speciala intenco krei la paskan atmosferon. Je la fino surpriza forlotumado, laŭ speciala maniero, de bolitaj ornamitaj ovoj aranĝitaj de F-ino H. Toussaint.

La 10an, D-ro T. Van Gindertaelen, Prezidonto de la Beneluksa Kongreso kaj komitatano de Flandra Ligo Esperantista, parolis pri « La Psikologio de la Murdo ». Li speciale substrekis la deziron pligrandigi la interkonsenton kaj la samlaboron inter la du ligoj, kiuj kune kun L.E.E.N., la Nederlanda Ligo, organizos la Beneluksan Kongreson. Poste li sukcesis interesigi la ĉeestantaron pri temo kiu estas iom altnivela kaj dum pli ol unu horo li tute kaptis la atenton de la aŭskultantoj kaj alvenis al la konkludo ke la juĝo pri la jes aŭ ne-kulpo de krimuloj postulas severajn ekzamenon kaj studon. Per specialaj laŭdvortoj S-ro M. Jaumotte, substrekinte sian konsenton kun la enkonduka parto de lia parolado, dankis D-ron Van Gindertaelen, kaj konkludis la vesperon, kiu nedubeble postlasis bonegan impreson.

Programo de la venontaj Kunvenoj :

Ĉiuvendrede en « Witte Leeuw » Frankrijklei, 4 je la 20a 30 h. (1-a etaĝo).

Majo : la 8an : parolata ĵurnalo; la 15an : parolado de S-ro Roger Jaumotte pri « Antikva Romo »; la 22an : E.K.I. vespero kun i. a. parolado de D-ro W. Solzbacher, Prezidanto de la Nord-Amerikaj Esperantistoj; la 23-24-25an Beneluksa Kongreso kun vespere, post-kongresa festeto, organizota de la Grupo, kun la kunlaboro de la junulara sekcio; la 29an raportoj pri la Kongreso.

Junio : la 5an : parolata ĵurnalo; la 12an : teoria ekskurso tra la urbo; la 19an : vizito al la antverpena kermeso; la 26an : diskutvespero.

Julio : la 3an : parolata ĵurnalo.

FUNEBRO

Niajn plej sincerajn kondolencojn ni pre-

zentas al nia sindona kasisto S-ro H. Sielens kaj lia edzino, pro la subita morto de ilia kara patro kaj bopatro.

BRUGO

Bruĝa Grupo Esperantista.

(Poŝtĉeknumero : 48.35.33)

La dua vintra balo de la grupo okazis sabaton 31-an de januaro en la danceja « Tabarin ». La sukceso estis kiel kutime grandega. La originala orkestro « The Moonliners », kun siaj neegaleblaj fantaziaĵoj, ankoraŭ pliagrabligis la ĉiam gajan atmosferon. Dum la sekvanta kunveno de la 3a de februaro, ĉiuj ĉeestantoj laŭvice esprimis siajn impresojn pri tiu brile sukcesinta balo. Dum la kunveno de la 24a de februaro, du lernintoj de la lasta kurso, S-ro Lenoir kaj S-ro Marcel Poupeye, kaj ankaŭ F-ino Yvonne Poupeye, antaŭlegis rakontojn de ili tradukitajn.

Vendredon 27an de februaro malfermiĝis, en la ejo de la Ruĝa Kruco, Langestraat, dua vintra kurso por deko da genovuloj. Tiu kurso nun daŭrigas ĉiuvendrede kaj estas regule sekvata de la gelernantoj, inter kiuj pluraj jam intencas partopreni en la Beneluksa Kongreso.

Plia eldono de la « Parolata Gazeto » aperis la 3an de marto, kun oficialaj komunikaĵoj de S-ro Ch. Poupeye kaj de F-ino Is. Van Parys, kaj interesaj artikoloj de : F-ino Y. Van Parys « Amuzaj Rakontetoj »; S-ro A. Bouquet, pri « Sonatoj »; S-ro G. Groothaert pri « Pentraĵoj de frenezulo ».

Dum la kunveno de la 10a de marto, F-ino Yvonne Poupeye antaŭlegis biografian noton pri Hendrik Conscience, (antaŭparolo el la libro « Rikke-Tikke-Tak » tradukita de Maria Posenaer). Sekvis debato pri « Nia klimato aŭ alia » en kiu partoprenis S-ino Braet, S-ro Groothaert, S-roj Ch. k. Karlo Poupeye, S-ro Bouquet kaj aliaj. La konkludo estis ke nia klimato ne estas la plej malbona.

La 17an de marto, la tuta kunvendaŭro estis dediĉata al provludado de aĉetota diskaŭdigilo per elektitaj diskoj afable pruntedonitaj de S-ro Groothaert. Post la kunveno, la plimulto et la ĉeestantoj iris kune al «Tabarin» kie la diskaŭdigilo estis bonrezulte probata en la danceja salonego.

Dum la kunveno de la 25a de marto, F-ino Is. Van Parys, kasistino, elpagis la kongresan ŝparkason al la ŝparintoj, por ke tiuj povu plej rapide ensendi sian aliĝilon al la Beneluksa Kongreso. Post tio humoraĵoj estis rakontataj de ĉiuj ĉeestantoj.

Gaja portretludado okazis la 31-an de marto kaj la 7an de aprilo aperis plia numero de la « Parolata Gazeto » kun interesaj artikoloj de S-ro Bouquet, pri « Intelektaj provoj (testoj) »; S-ro Groothaert pri « Testmaŝino en la uzo de la armeo »; F-ino Yvonne Poupeye, pri « La Strateto de la Blinda Azeno, sekvo : Okcidenta parto »; S-ro Marcel Poupeye pri « Vivo de A. M. Ampère »; kaj S-ro Ch. Poupeye, pri « Artikolo el l'Illustration de aŭgusto 1912, pri la Krakova Kongreso ».

Fondo de Esperanto-Komitato Intergrupa en Bruĝo.

Antaŭvide al la komuna Beneluksa Kongreso en Antverpeno, klopodoj estis farataj en Bruĝo por ebligi kunlaboradon inter la « Bruĝa Grupo » aliĝinta al RBLE. kaj « Paco kaj Justeco » loka sekcio de FLLE.

Post prepara interparolado inter la du prezidantoj : S-roj Ch. Poupeye kaj F. Roose, okazis la 12an de februaro en « Tabarin », komuna kunveno inter ambaŭ komitatoj.

Sekvis dimanĉon 8an de marto, en la grupa sidejo « Cornet d'Or », komuna posttagmeza manĝeto, proponata de la Bruĝa Grupo kaj ĉeestata de 16 el ĝiaj membroj kaj de 13 membroj de « Paco kaj Justeco ». S-ro Ch. Poupeye bonvenigis ĉiujn ĉeestantojn, kies nomojn li proklamis por reciproka konatiĝo, kaj poste li legis gratulan leteron de S-ro Jaumotte, Prez. L.K.K. de la Beneluksa Kongreso. Je la fino de tiu parolado ĉiuj ĉeestantoj kunkantis « La Espero » (n).

Agrablaj interparoladoj ekiĝis ĉiuflanke dum la manĝeto, kiu estis plie agrabligata per pianoludado de S-ro A. Bouquet, S-ino Poupey kaj F-ino M. L. Roose.

S-ro F. Roose, Prez. de « Paco kaj Justeco » esprimis dankojn kaj pledis por pli serioza kaj pli scienca laborado por E°. S-ro Groothaert prezentis la « Oran Libron » de la « Bruĝa Grupo » kaj petis la invititojn subskribi ĝin. Post rekantado de « La Espero », la partoprenintoj disiĝis ĉirkaŭ la 21a en plej bona spirito.

Kelkajn tagojn poste, jaŭdon 12an de marto, komitatanoj de ambaŭ grupoj denove kunvenis en « Tabarin » kaj post funda diskutado kaj difino de Statuto, definitive fondis la Esperanto-Komitaton Intergrupan. S-ro El. De Craecke, denthirurho en Bruĝo, membro de ambaŭ grupoj, akceptis ĝian honoran prezidantecon kaj por 1953 la estraro estis elektita jene : Prezidanto : S-ro Ch. Poupeye, prezidanto de la « Reĝa Bruĝa Grupo Esperantista »; Vicprezidanto : Drs F. Roose, prezidanto de « Paco kaj Justeco »; sekretario : S-ro André Dumarey (Fl. Ligo) Generaal Lemanlaan 142, Assebroek; Kasisto : S-ro Georges Groothaert (Belga Ligo).

Programo de la venontaj kunvenoj :

Ordinara kunveno : ĉiumarde je la 20a, en la sidejo « Gouden Hoorn - Cornet d'Or » » Simon Stevinplaats.

Dum ĉiu kunveno iu membro prezentos malgrandan paroladon.

Majo : 5 an : Oratora konkurso. 12an : Parolata Gazeto; 19an : Lastaj aranĝoj por la kongreso; 26an : Raportado pri la kongreso.

Junio : 2an : Leksikon kartludado; 9an : Parolata Gazeto; 16an : Portretludado; 23an : Humoraĵoj; 30an : Debato : « La preferataj libertempoj ».

Plie, ĉiuvendrede je la 20a, en la ejo de la Ruĝa Kruco, Langestraat, daŭrigo de elementa kurso.

EL LA ESPERANTA FAMILIO

Gratuloj.

Al Ges-roj J. DECOSTER-VERHELST el St-Andries, kaj al Ges-roj K. DECOSTER-BILLIET el Bruĝo, ĉiuj kvar membroj de la Bruĝa Grupo, pro naskiĝo de kvara filo kaj nepo : Francis, la 23an de marto 1953.

BRUSELO

Esperantista Brusela Grupo.

(Poŝtĉeknumero : 12.30.48)

La 2-an de februaro kaj la 2-an de marto, okazis parolata ĵurnalo. Ambaŭfoje S-ino ERNST akiris la plej altan poentnombron.

La 9-an de februaro, S-ro SWINNE faris tre interesan paroladon pri : « Oro kaj Paco ». Li pritraktis la temon : « Ĉu la moderna monsistemo, bazita sur la oro, estas kunigebla kun daŭra paco ? » Laŭ la parolinto — Ne ! kaj li citis la libron de SILVIO GESELL : « La natura ekonomia Ordo », libro, kiu estas jam tradukita el la germana lingvo en diversajn aliajn lingvojn, kaj kiu naskis la movadon por liberekonomio.

La 16-an de februaro S-ro Vander Stempel gvidis, laŭ sia kutima lerta maniero, la perfektigan kurson.

La 23-an de februaro, S-ino Stern tre interese prelegis pri RICHARD WAGNER, kaj aŭdigis al ni el « Lohengrin », « Walküre » kaj el la « Majstrokantistoj de Nürnberg » kelkajn diskojn. S-ino STERN plene sukcesis prezenti al ni la grandan majstron per vortoj kaj per muziko. Ŝi rikoltis multe da aplaŭdo kaj laŭdaj vortoj.

La 9-an de marto, estis la vico de S-ino ERNST, kiu detale resumis romanon, nome « La alia Pasinteco », kaj sukcesis interesigi la geaŭskultantojn dum pli ol unu horo. En tre lerta kaj streĉa maniero, ŝi atentigis la gesamideanojn pri la novaperinta libro.

La 16-an de marto, ni aranĝis gramatikan vesperon, kiun ĉiuj entuziasme partoprenis.

La 23-an de marto, estis la vico de S-ino CASTEL. Kiel ĉiam okaze de ŝiaj vesperoj, la gemembroj multnombre alvenis, ĉar ili esperis pasigi gajan vesperon, kaj ili ne seniluziiĝis. Sino CASTEL rakontis tre bone elektitajn gajajn historietojn, kaj poste manĝigis al la ĉeestantoj la de ŝi mem faritajn bongustajn lorenajn karnavalajn frandaĵojn. Bona kafo estis servata, kaj tiu kulinara vespero finiĝis en bona humoro.

La 30-an de marto, F-ino KESTENS promenigis nin tra malnova Bruselo, kaj atentigis nin pri historiaj malnovaj kvartaloj.

Programoj de la estontaj kunsidoj :

Majo : la 4an : Parolata ĵurnalo; la 11an : S-ro Castel parolos pri « Hispana Popolpoezio » kaj pri « La hispana poeto G. A. Becquer (1837-1870) »; la 18an : Perfektiga kurso.

Junio : la 6an : Parolata ĵurnalo; la 8an :

Humoraĵoj

Feliĉaj la kredantoj !

Ĉe landlima stacidomo.

Jus enveturis vagonaro de pilgrimantoj revenantaj de Lourdes. En siaj pakaĵoj ĉiuj kunportas ujojn enhavantajn akvon de la konata mirakla groto.

La oficistoj de la doganejo konas tiun kutimon, kaj montriĝas toleremaj. Tamen, jen vojaĝanto kun tiom da boteloj, ke la doganisto fariĝas suspektema. Li prenas unu el la boteloj, malŝtopas ĝin, kaj tuj elsendiĝas nekonfuzebla odoro de konjako.

« — Tiu benita akvo ne ŝajnas al mi tre katolika ! « li severe diras.

La pilgrimanto siavice kaptas la botelon, flaras ĝin, kaj mirigite ekkrias:

« — Miraklo !! Jam !!! ».

*

Alia miraklo.

Estas varmege, sur kruta deklivo.

Kompatinda ĉevalo suprentrenas plenplenan ŝarĝveturilon.

Ŝvitegas ĉiuj : la kondukisto, la ĉevalo kaj akompananta hundo.

Ellasinte ĝemegon, diras la ĉevalo :

« — Neniam, en mia ĉevala vivo, mi supreniris tiom krutan deklivon. »

La kondukisto, mirigite, al la hundo :

— Ĉu vi jam aŭdis ĉevalon paroli ?

La hundo :

— Mi ! neniam !

*

Pri gustoj kaj koloroj !!

Kliento. — Mi ŝatus aĉeti siringokoloran kravaton.

Vendisto. — (trasercinte sian sortimenton) Ĉu tiu violkolora ne estus laŭ via gusto ?

Kliento. — Ne. Mi preferas siringokoloran.

Vendisto. — Kaj tiu vinfeĉkolora ?

Kliento. — Mi ripetas al vi ke mi volas, ke mi volegas siringokoloran. Mi cetere vidis unu en via montrofenestro.

Vendisto. — Kial vi ne diris tion tuj ! Bonvolu esti sufiĉe afabla montri ĝin al mi.

(Ambaŭ eliras, kaj la kliento indikas al la vendisto la alsopiratan kravaton).

Vendisto. — Sed ĝi estas blanka !

Kliento. — Ĉu vi neniam vidis blankan siringon ?

*

Ni estu seriozaj en niaj informoj.

Ie, sur trotuaro, en la lando de la kvara dimensio.

1-a pasanto. — Ĉu vi povus diri al mi kie estas la kontraŭa trotuaro ?

2-a pasanto. — Je la alia flanko de la strato.

1-a pasanto. — Neeble, Sinjoro ! Mi jam tie faris la saman demandon, kaj oni sendis min tien ĉi.

*

Kompetenteco.

Antaŭ nelonge, en eleganta kabareto de Hollywood, aktorino kiu distingiĝas per sia kutimo flati la influhavantajn personojn, alproksimiĝis dolĉmiene la tablon de la konata kritikisto N..., kaj diris al li per miela voĉo :

« — Mi ne scias kiel esprimi al vi kiom mi ĝuas la legadon de viaj artikoloj !

— Bone, respondis N..., « sendu iun kiu scias. »

*

Afrika medicino.

...Kaj pri anestezio, estas tre praktike : Kiam ni ne plu havas kloroformon, ni uzas muŝojn Tsé Tsé.

*

La urbestro vidviĝis.

Ĉar jus mortis lia edzino, la urbestro volis ke la tuta urba konsilantaro grupigite ĉeestu la enterigon.

La sindiko kontraŭstaris tiun deziron, donante la kialon ke ne estis la kutimo en la lando.

— Se estus mortinta vi, li diris, ni ĉiuj kun plezuro ĉeestus.

S-ro Jacobs : « La kancero »; la 15an : Perfektiga kurso; la 22an : S-ro Verdier : « Helikopteroj »; la 29an : S-ro Jirousek : « Dek spritaj historioj ».

Julio : la 6an : Parolata ĵurnalo; la 13an : S-ro Van Geit : « Pri insektoj » sekvota de surprizoj.

GENTO.

Genta Grupo. — Sinjorino De Rijcke finis la serion de unuagradaj lecionoj, kiun ŝi komencis en la monato Oktobro; ĉar ŝi foriris al Hispanujo, kompletigaj lecionoj estas nune gvidataj de gesinjoroj Vandevelde. Tiuj lecionoj okazas ĉiumarde en la ŝtata mezgrada lernejo, sekve de permeso ricevita de la Ministrejo, antaŭ 5 jaroj.

(Oni ne konkludu ke temas pri lecionoj al la ordinaraj lernantoj en tiu lernejo; oni akuzus nin pri fanfaronaĵo.)

Bibliografio

ESPERANTO-WOORDENBOEKJE, de C. L. de Veer, kvara eldono (300 + 278 paĝoj, 10.5 x 8 cm., kartonita). Eldonejo H. Meulenhoff, Herengracht 86, Amsterdam. Prezo 3.95 ned. fl. Havebla ĉe Belga Esperanto Instituto.

En la Esperanto-Nederlanda parto de tiu bonega vortaro troviĝas ĉiuj radikoj de la Fundamento kaj de la ses aldonoj. La nombro de la ne-oficialaj radikoj estas konsiderinde pligrandigita. Al la Esperanta-Nederlanda parto estas aldonitaj proksimume 500 vortoj, unue vortoj kiujn oni regule trovas en la literaturo kaj kiujn oni ne plu povas konsideri kiel neologismojn. Rilate al tio kelkaj ŝanĝoj okazis en la Nederlanda-Esperanta parto.

La libro estas zorge reviziita. En ĝia beleta griza vestaĵo, klare presita sur blanka papero, ĝi certe plaĉos al la leganto. Ĉiu Nederlandlingva Esperantisto deziros ĝin posedi, des pli ke oni uzis la novan ortografion.

K.

RUI BARBOSA (1849-1923). Biografia eseo de *Fernando Nery*. El la portugala lingvo tradukis *Jozefo Joels*. Eldonis « Casa de Rui Barbosa », Rua São Clemente, 134, *Rio de Janeiro*. 292 paĝoj 23 x 15.

Estas fakto ke publiko kaj kronikistoj prefere interesiĝas pri elstaraj figuroj de la historio, pri kies talentoj mi eĉ ne volas dubi, sed kiuj ĉefe sin famigis per siaj intrigoj kaj perfidaĵoj. Kiom da libroj pri la Talleyrand, Fouché kaj aliaj diablaj eminentuloj !

Ĉu tial ke la homoj virtaj, same kiel la popoloj feliĉaj, ne havas historion ?

Ni admiru do la kuraĝon de S-roj Fernando Nery kaj Jozefo Joels, aŭtoro kaj tradukinto de la subrubrika biografio de perfekta honestulo kiu, laŭ la vortoj de S-ro Carlos Domingues, prezidanto de la Brazila Esperanto-Ligo, « dediĉis sian vivon al senĉesa batalo por la Justeco, kaj estis samtempe la plej granda ŝatisto de Brazilo kaj unu el la plej grandaj verkistoj en la portugala lingvo ».

Deputito, senatano, ministro, vicestro de la ŝtato, Rui Barbosa supreniris preskaŭ la tutan ŝtuparon de la politikaj honoroj kaj, se li ne atingis la supron : la prezidantecon de la respubliko, estis pro kialoj tute fremdaj al la volo de la plimulto.

Advokato pro la profesio, politikisto pro la volo de siaj samlandanoj, beletristo pro amo al la belo, lia preferata batalkampo tamen estis la gazetaro.

« En la lando, kie la parlamento malĝuste reprezentas la popolon, la plumo de gazetverkisto valoras pli ol la elokvento de oratoro » (respondo al César Zama, en la Brazila Senato).

Tia deklaro jam atentigas la laikon pri la naturo de la libereco en la tiama Brazilo.

LA STUDENTO

Organo de internacia federacio de esperantistaj studentoj kaj altlernejanoj informas la abonintojn de « malgranda revuo » ke ĝi daŭrigos aperigi kulturajn kaj literaturajn artikolojn. La nomoj de ĝiaj kunlaborintoj kaj kunlaborontoj garantias la altan kvaliton de tiuj artikoloj. Ni notu inter aliaj : Wm Auld, D-ro Fujio Egami, Stellan Engholm, D-ro W. Manders, D-ro Paul Neergaard, Prof. Edmond Privat. Par abonprezo de nur fr. 50.— vi ricevos en 1953 minimume 6 numerojn 12 paĝojn. Perantoj por Belgujo estas : Belga Esperanto-Instituto, Oostenstraat, 26, Antwerpen. PCK N° 1689.58.

En la parlamento, Rui Barbosa estis reprezentanto de la liberala partio.

Ĉu monarhisto ? Ĉu respublikano ? Ni lasu lin respondi mem.

« Mi ĉiam estis asertanta la indiferentecon de la formoj de regado, la egalvalorecon de ĉiuj konstitucioj — ĉu tiuj estas monarhiaj, ĉu respublikaj — se per ili estas garantiata al la popolo regado parlamenta kaj al ĉiu individuo reĝimo de laŭleĝa libero. »

El kio konsistis la programo de Rui Barbosa. Ni denove transdonu al li la parolvicon.

« Elradikigi la sklavecon (persistinta ĝis 1888); tipari la miksaĵojn de la imperia reĝimo (falinta en 1889), kaj ĉesigi la ekcesojn de la respubliko, por konstrui la liberon kaj politikon pli dignon, pli noblan ol tiu, kiun praktikis la korteganoj dum la imperio, aŭ la lakecaj oportunistoj dum la tiraneco. »

Bela tasko por justulo, kiel Rui Barbosa, ĉe kiu, kiel ĉe la poeto, la agado estis fratino de la revo. Sed tasko danĝera en lando kie, sur la politika batalkampo, la leĝo de « Vae Victis » estis speciale peza por la venkitoj. Ĉar se Rui Barbosa konis ja triumfajn horojn, li ankaŭ konis la ekzilon kaj, ĝis en eksterlando, la embuskojn de spionoj kaj de dungitaj murdistoj.

Ĉu fine tiom da sindonemo, da kuraĝo, da talento havis almenaŭ praktikan rezultaton?

La respondon donos al ni Pedro II, la detronigita imperiestro de Brazilo.

La 15an de Novembro 1889, jam sur la ŝipo « Alagoas », survoje al ekzilejo, Pedro II trovis la jenan klarigon : « Mi estis forgesinta pri Rui Barbosa, kiu estis la mentoro, la intelekta gvidanto de la nova situacio. »

Saluto de venkito al lojala venkinto, kaj ankaŭ de la malnova reĝimo al la arhitekto de la nova.

Ĉar la verkaro de Rui Barbosa restas ankoraŭ grandparte neeldonita, ĝi verŝajne nur estos pritraktata en posta aldono al la eseo de S-ro F. Nery. Ĉiel ajn, la gravecon de la rolo de Rui Barbosa sur la beletristika kampo montras lia elekto, en 1908, kiel prezidanton de la Brazila Literatura Akademio.

* * *

La traduko de S-ro Jozefo Joels estas prezentata kiel kontribuaĵo de la Brazila Esperanto-Ligo al la programo organizita por soleni la centan datrevenon de la naskiĝo de Rui Barbosa.

« Mi devas manifesti miajn esperon kaj fidon » diras S-ro Carlos Domingues, jam menciita « ke la esperantistoj, en ĉiuj ceteraj landoj, plezure akceptos la verkaĵon, kiun iliaj brazilaj samideanoj alportas al la komuna trezoro de nia literaturo ».

Ni aldonu ke ĝi ankaŭ estas praktika aplikо de unu el la plej atentindaj ebloj de Esperanto : permesi la diskonigon de libroj verkitaj en lingvoj ne multe disvastigitaj.

Estas plia kialo por bonvenigi la nove alveninton. H. CASTEL.

Troilo kaj Kresida, tragedio-komedio en kvin aktoj de William Shakespeare, tradukita de Stephen A. Andrew. Eld : The Esperanto publishing Co Ltd. Havebla ĉe Belga Esperanto-Instituto.

Apero de nova traduko de Shakespeare estas ĝojiga fakto. Pro tio mi prenis kun intereso la ĵus aperintan libron.

Bedaŭrinde ĝi ne respondis al nia espero. Apenaŭ mi sukcesis legi ĝin ĝis la fino. Mi ne povas kompari la tradukon al la originala teksto: sed mi facile imagas ke la tradukinto pene klopodis redoni ĉiujn nuancojn de la teksto. La rezulto estas verko peza; la stilo tute ne estas flua; je ĉiu iom longa vorto oni devas halti por kompreni la sinsekvon de sufiksoj kunflikitaj.

Eble la aŭtoro laŭtlegos sian tradukon, kaj ĝin plibonigos, ĝis ĝi estos facile kaj flue legebla kaj komprenebla. Tiam ni volonte konsilos al la literaturamantoj ĝin aĉeti kaj legi. P. K.

LAGO DE COMO. — Lastjara publikigo de tiu eldonaĵo atingis tiel sukcesplenan rezulton, ke « Ente provinciale per il Turismo » represigis novan, pli belan, kolorilustritan faldfolion kaj gvidlibreton.

Ekzempiero estis aldonita al la antaŭa numero tiamaniere ke niaj membroj povis juĝi mem pri tiu eldonaĵo. Ni insiste petas, ke ili gratulu la eldonanton kaj petu de ĝi aliajn ekzemplerojn. Adreso « Ente provinciale per il Turismo » Piazza Cacciatori delle Alpi *Como* (Italujo) kie oni korespondas en Esperanto.

LES ENTREPRISES
DERKS
226, Rogierstrato, BRUSELO
Tel. : 15.19.92
Entrepreno de
KONSTRUAĴOJ

Por viaj esperantaĵoj, libroj, insignoj k. c.
Belga Esperanto-Instituto
26, Oostenstraat, 26
ANTVERPENO
kiu ankaŭ havigos al vi nacilingvajn librojn, revuojn kaj gazetojn, kaj ĉiuspecan skribmaterialon.

BRUGGE BRUGES
Hôtel du Cornet d'Or
2, Simon Stevinplaats, 2
Centra situo - Moderaj prezoj
— Moderna komforto —
Sidejo de « Bruĝa Grupo Esperantista »
— Tel. 314.59 —

G. FAES
16, Schoenmarkt, 16
ANTVERPENO
— Por via MUZIKO, RADIO kaj GRAMOFONO

BELGA ESPERANTO-INSTITUTO, koopera societo.
26, Oostenstraat, Antverpeno.
Ĵus aperis :
D-ro IVO LAPENNA :
Aktualaj problemoj de la nuntempa internacia vivo :
Fundamentaj nocioj; lukto por la paco per juraj rimedoj; internaciaj organizaĵoj. — Prezo : 70 fr.
Ankaŭ ĉiujn aliajn Esperanto-eldonaĵojn oni povas mendi ĉe **Belga Esperanto-Instituto, 26, Oostenstraat, Antverpeno.**
Belga Esperanto-Instituto akceptas abonojn al eksterlandaj Esperanto-gazetoj.

Verreries et Miroiterie DESMECHT & Co
LA LOUVIERE S.P.R.L. Tel. n-roj 223.01 - 225.37
Du esperantaj markoj :
TABULO, por lernejtabuloj; KATOKULO, por signalvitroj.

VOJAĜAGENTEJO **ULTRA MONTES**
24, Koningin Astridplein, Antverpeno. — Tel. 32.76.15
17, rue d'Arenberg, Bruselo. — Tel. 12.55.02
ĈIUSPECAJ VOJAĜOJ AL ĈIUJ LOKOJ
— Vojaĝkartoj kaj rezervoj por Fervojoj, Aviadiloj kaj Ŝipoj. —

REĜA BELGA LIGO ESPERANTISTA

ASOCIO SEN PROFITA CELO

Prezidanto : D-ro P. Kempeneers 106, rue General Lotz, Uccle-Bruselo.
Vic-Prezidanto : S-ro M. JAUMOTTE, 44, avenue De Bruyn, Wilrijk-Antverpeno.
Generala Sekretario : S-ro H. SIELENS, Houwerstraat, 12, Antverpeno.
Sekretario : S-ro Joseph SOYEUR, 91, rue du Chêne, Seraing.
Kasistino : S-ino J. PLYSON, 185, rue Jourdan, Saint-Gilles-Bruselo.

KOMBINATAJ KOTIZOJ

Reĝa Belga Ligo Esperantista kaj Universala Esperanto-Asocio

	A.	B.	C.
I. *Simpla membreco* (enhavas membrecon al la loka Grupo — se ekzistas — al la Ligo kaj al la internacia organizaĵo: rajtigas ricevi la nacian gazeton « Belga Esperantisto » kaj la internacian kuponaron por servoj)	25,—	50,—	100,—
Familia membro (same, escepte la gazeton)			50,—
II. *Membreco kun individua* aliĝo al la internacia organizaĵo:			
a) *Membro kun Jarlibro* : kiel simpla membro; ricevos krome la Jarlibron kaj ĝian aldonon	75,—	100,—	150,—
b) *Membro Abonanto* : kiel membro kun Jarlibro; ricevas krome la monatan internacian gazeton « Esperanto » ...	165,—	190,—	240,—
c) *Membro Subtenanto* : kiel membro abonanto; pagas pli altan kotizon por helpi la movadon	250,—	275,—	350,—

III. *Bonfaranta Membro* memvole aldonas almenaŭ 25 fr. al sia kotizo, speciale por helpi al R. B. L. E.

Pagu al via loka grupo; se ne ekzistas, al poŝtĉekkonto 1337.67 de Reĝa Belga Ligo Esperantista.

A. Kadetoj (ĝis 18 j.); B. Junuloj (ĝis 21 j.); C. (21 j. kaj pli).

BELGA ESPERANTO-INSTITUTO

Koopera Societo

D-ro L. L. Zamenhof, 1859 1917. Aŭtoro de Esperanto. — Reproduktaĵo sur poŝtkarto, de la bildo de nia Majstro pentrita kaj donacita al Internacia Esperanto-Muzeo, Wien, de artpentristo Ach. Bentos. Eldono « Esperanto », Oostenstr. 26, Antwerpen. Prezo : Fr. 2,—. La sama bildo estas havebla kiel vera fotografaĵo. Prezo : poŝtkartformato : Fr. 10,—; 24 x 30 cm., Fr. 65,—; 30 x 40 cm., Fr. 100.

Imp. Lielens, s. p. r. l., 18, rue de la Princesse, Bruxelles — Tél. : 21.10.98 — 21.87.90